

Redakta Komitato: D-ro A. Albault, M. Ĝivoje, Prof. J. Görlich,
D-ro P. Neergaard, Prof. B. Popović, Prof. S. Reiersöl, C. Stöp-Bowitz.
Ĉefa kaj respondeca redaktoro Prof. B. Popović, Ognjena Price 80, BEO-
GRAD, Jugoslavio

Lingva kontrolanto Prof. M. Šaponjić, Svetosavska 23/I,
BEOGRAD, Jugoslavio

Eldono de INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA
Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 7,5 Ned. gld. = 2,2
dol. = 25 N. Din.

Por membroj de I. S. A. E. la jarabono 25 steloj (la jarktizo 10 steloj)
La abonojn kolektas la landaj delegitoj de ISAE
(La listo troviĝas sur la lasta kovrilpaĝo)

Izdaje nauĉna sekcija Saveza esperantista Jugoslavije Svetosavska 16
Beograd (=jugoslovenŝka podružnica Međunarodnog nauĉnog društva
esperantista). Za izdavaĉa: odgovorni urednik Prof. Dr. Bož. Popović,
(Ognjena Price 80, Beograd)

Ŝtampano u »VUK KARADŽIĆ«, Niš; Stanka Paunovića 72, Telefon 25-444

SCIENCA REVUO

UDK 001 (05) = 408.92
Vol. 19
N-ro 2 (74)
10. 6. 1968.

Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 2,2 us. dol. = 25 din

Enhavo:

Avoto: Vortofteco

B. Popović: Scienca kunlaborado en Eŭropo

B. Popović: Sciencaj revuoj en malgrandaj landoj

J. Matvijišin: Ukraina sciencisto de XV jarcento

R. Hauptenthal: Komparo inter EGM kaj UV

R. A. Lewin: Surteraj vivaĵoj ankoraŭ nekonataj

VORTOFTECO

(A. W. Thomson, Welling, Britujo)

En la numero 1447 de HEROLDO aperis listo de „550 plej oftaj
vortoj kaj radikoj”, kompilita de W. A. Donner.

Estus interese scii, laŭ kia bazo s-ro Donner faris siajn kalkulojn.
Kiom da libroj li analizis? Kiom da aŭtoroj li studis? Ĉu la koncernaj
verkoj estis plejparte beletraĵaj, teknikaj, romanaj, poeziaj — aŭ ĉiu-
specaj?

La vortprovizo de diversaj verkistoj varias multe. Eĉ tiu de
unuopa verkisto varias laŭ temo. Estus pardoneble supozi, ke s-ro
Donner efektive ne faris sisteman enketon, sed elektis siajn vortojn
arbitre. Estas strange, trovi en lia listo eĉ maloftajn vortojn, ekz. **ci**,
des, **ju**, **nenial**, **neniom** (erare presita **nenion**), **kaj po**. Ili estas bone
konataj, sed ne ofte uzeblaj.

Zamenhof mem kutime uzis tre simplan, klaran stilon, kun notinda procentaĵo da unusilabaj vortoj. En 1963 HEROLDO eldonis, 46 jarojn post lia morto, kvaran kolekton de Andersenaj fabeloj. Ŝajne ili troviĝis inter liaj lastaj kaj plej maturaj manuskriptoj, alie ili estus aperintaj pli frue. Lia bele flua manipulado de simplaj vortoj, kaj lia lerta kombinado de radikoj, estas valora modelo por ĉiuj aspirantaj verkantoj.

Leginte tiun ĉi libron, mi decidis ĝin analizi detale el pluraj anguloj — precipe rilate al la ofteco de unusilabaj vortoj — kaj la rezultoj, kiujn mi resumas sube, estas interesaj.

La 24 fabeloj enhavas sume 66,084 vortojn, inkluzive la titolojn, sed ne kalkulante la parte anglan piednoton en paĝo 142 (kiu cetere havas preseraron — „1998” anstataŭ „1908”). El tiuj 66,084 vortoj, ĝuste 23,166 estas unusilabaj — 35.06%! Malmultaj el niaj ĝisnunaj verkistoj povus atingi tian procentaĵon, kaj samtempe produkti fluan, klaran, gracistilan literaturon.

Zorge traserĉante plurajn vortarojn mi eltrovis ke, ekster la tabelo de afiksoj, Esperanto posedas 90 memstarajn unusilabajn vortojn, el kiuj 89 aperas en la kvara Fabelaro. Du specojn mi konvene grupigis en miaj kalukuloj. La unua estas la **pronomoj** — mi, ci, li, ŝi, ĝi, ni, vi, si, kune kun ties akuzativaj formoj. La dua estas la **numeraloj** — du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent, mil.

La rezulta tabelo, kiu sekvas, sugestas ke eble kompostistoj povus ŝpari tempon kaj monon, se ili havus ok novajn tipojn: LA, KAJ, DE, kaj EN, kun kaj sen majuskloj. Ĉu iu presisto volas esprimi opinion pri tio?

VORTOJ	FOJOJ	%	VORTOJ	FOJOJ	%
LA	5872	8.886	TRA	77	0.117
Pronomoj	4376	6.622	ĈU	76	0.115
KAJ	2536	3.838	Aŭ	65	0.098
DE	1435	2.171	DUM	65	0.098
EN	1344	2.034	SUB	65	0.098
AL	762	1.153	HA, HE, HO	62	0.094
NE	594	0.899	PRO	58	0.088
SUR	471	0.713	JES	55	0.083
KE	469	0.710	ĜIS	53	0.080
SED	445	0.673	JEN	50	0.076
EL	336	0.508	PLU	48	0.073
POR	333	0.504	POST	41	0.062
PRI	291	0.440	JE	38	0.058
KUN	290	0.439	FOR	35	0.053
PLI	252	0.381	TRO	35	0.053
PER	251	0.380	NEK	32	0.048
NUN	233	0.353	TRANS	32	0.048
ĈI	231	0.350	TUJ	31	0.047

DA	198	0.300	LAŭ	30	0.045
NUR	188	0.284	KROM	20	0.030
PLEJ	182	0.275	DO	17	0.026
ĈE	157	0.238	NU	14	0.021
Numeraloj	142	0.215	SEN	14	0.021
TRE	119	0.180	DES	11	0.018
OL	98	0.148	AJN	8	0.012
SE	93	0.140	JU	5	0.008
ĈAR	89	0.135	AJ, VE	3	0.005
JA	88	0.133	JUS	3	0.005
ĈE	84	0.127	PO	3	0.005
MEM	81	0.123	FI	1	0.001
JAM	79	0.120	EK	0	0.000
				SUME —	23,166 35.057

Mi nun pritraktos aliajn aspektojn de la kvara Fabelaro. Ekzemple, mi esploris la iom neregulan manieron en kiu Zamenhof renkontis la problemojn de nomenklaturado.

Entute 204 nomoj aperas en la Fabelaro, kelkaj el ili plurfoje. El tiu nombro, 95 estas „asimilitaj” (Esperatno-formaj), kaj 109 „neasimilitaj” (nacilingvo-formaj). Mi apartigis ilin en tri klasojn:—

- (1) **Personaj nomoj**, kiujn mi titolas HOMNOMOJ. Troviĝas 100, el kiuj 32 asimilitaj kaj 68 ne.
- (2) **Geografiaj nomoj**, kiujn mi titolas LOKNOMOJ. Troviĝas 83, el kiuj 44 asimilitaj kaj 39 ne.
- (3) **Aliaj nomoj**, sume 21, el kiuj 19 asimilitaj kaj 2 ne.

En la listoj, la ciferoj, indikas la unuan (ankaŭ foje duan, eĉ trian) aperlokon; postaj aperoj aldonas literojn „kp” (kaj poste). Unue vidiĝas paĝnumero, poste cifero kaj litero; la cifero montras la linion, la litero „a” signifas „kalkulita de supre”, la litero „z” signifas „kalkulita de mal-supre”, kaj la litero „t” signifas „en ĉapitro-titolo”. Tiu ĉi montra sistemo validas ankaŭ por aliaj sekcioj de tiu ĉi monografio. Jen la kompletaj listoj:—

HOMNOMOJ — Asimilitaj (32):

ALBANO. 68/5a 68/7z	JOHANINO. 76/17a kp
ALFREDO. 147/1a kp	KLARO. 185/15a kp
ANNO. 76/18a kp	ANNETO. 109/t kp
ANSGARIO. 37/5a 40/9z	KRISTO. 37/6a 40/4z kp
	KRISTIANO. 160/8z 161/1a
	(v. CHRISTIAN)

BAŬCIDO. 125/3z 126/13z
 BENEDIKTO. 69/13z
 DAVIDO. 192/1a (v. DAVID)
 DOROTEO. 76/18a kp
 EMILO. 130/11z kp
 ERIKO. 69/13z
 FILEMONO. 125/3z 126/13z
 FREDERIKO. 125/5z
 GALATEO. 152/5z 155/3a
 GEORGO. 165/13a kp
 IDO. 76/17a kp
 JESUO. 45/7a 111/16z 172/12a
 185/2z

LONGMARGARETO. 180/14a kp
 MAHOMETO. 29/5a
 MARGARETO. 126/7z
 MARIO. 186/17z (v. MARIA)
 MARTENO. 233/4z (—INO 233/7z
 eraro)
 MOSEO. 19/13z 198/10a
 NAPOLEONO. 198/8z
 PIGMALIONO. 152/6z 155/3a
 SNIO. 184/5a
 SOFIO. 153/17a kp
 VALDERMO. 75/t kp
 VENERO. 149/8z

HOMNOMOJ — Neasimilitaj (68):

ABSALON. 131/3a
 ADAM. 103/1a
 ANDERS. 205/2z
 BAGGESEN. 130/15a 130/3z
 BALDUR. 37/14z 46/3a 52/1a
 BIRCKNER. 130/16a
 BRÖNNE. 183/13a
 BUGGE. 168/7a 168/14a 180/17z
 CAMMA. 125/1z
 CASPAR. 148/4a
 CHRISTIAN. 205/2z 216/16a
 (v. KRISTIANO)
 CHRISTOPH. 208/12a
 DAVID. 98/17z (v. DAVIDO)
 DE MÖLLER. 130/11z
 DOE. 75/t kp
 ELSE. 175/1a
 ESAV. 204/5a
 EVA. 103/1a
 FLAMBEK. 130/5z
 FREIA. 24/1z
 FRIDRICH. 208/12a
 GAMBARUK. 184/7a
 GELLERT. 208/13z
 MONTFAUCON. 202/10z
 MORTEN. 173/7z kp
 NIELS. 182/13z kp
 NOA. 80/12z 104/4z
 ODIN. 24/1z
 OEHLENSCHLÄGER. 125/4z
 OERSTED. 205/1z
 OLE. 101/t kp
 OVE. 84/13z kp
 PREDBJÖRN. 168/15z
 RAHBECK. 125/1z

GOLDSTERN. 168/15a
 HAGBARTH. 127/3a 127/5a
 HAMLET. 168/3z 187/4a
 HANS. 205/2z
 HAUSER. 148/4a
 HELGA. 33/1z kp
 HOLBERG. 127/21a 131/4a
 INGEMANN. 127/11z
 INGER. 91/9z kp
 JAKOB. 204/4a
 JENSEN. 110/17a
 JOEL. 119/5z
 JOHANN. 208/11a
 KALA. 149/13z kp
 KAREN. 149/13z
 KLOPSTOCK. 208/13z
 KNUT. 69/15a kp
 LARS. 113/12z
 LOKEMANN. 169/16a 184/1a
 LUTER. 198/8z
 MADS. 110/17a
 MALENE. 149/13z
 MARIA. 185/3z (v. MARIO)
 RAMEL. 84/13z
 RICHARD. 216/17a
 SCHILLER. 207/t
 SIGNES. 127/4a 127/5a
 SOLON. 204/14a kp
 SVANWEDEL. 181/13a
 THOR. 24/1z
 THORWALDSEN. 124/6z 150/10z
 VALPURGA. 103/16z
 WEYSE. 126/1z
 WINTHER. 216/16a

LOKNOMOJ — Asimilitaj (44):

ALPOJ. 53/11z 161/8a
 ANGLUJO. 186/3z
 ARABUJO. 58/7z
 BAVARUJO. 211/5z kp
 BRITUJO. 27/19a
 DANUJO. 61/18a kp
 EGIPTUJO. 22/2a 23/3a kp
 EŬROPO. 125/3a
 FRANCUJO. 212/12z
 GALLA. 27/18a
 GERMANUJO. 212/14z
 GRANDA BELTO. 75/2z 76/1z 79/4a
 HERKULANO. 150/7a
 HISPANUJO. 157/2a kp
 HOLANDO. 173/5z kp
 HOLSTINIO. 129/6a
 ISLANDO. 184/18a
 ITALUJO. 149/4a kp
 JUTLANDO. 19/3z 58/15a 76/3z kp
 KOPENHAGO. 125/1a kp
 LIMFJORDO. 20/12a (sen „o” 184/3a
 185/4z)
 LONDONO. 125/5a

MEDITERANEA MARO. 53/10z
 148/3z
 NEAPOLO. 125/5a 150/2a
 NILO. 19/12z 29/18z kp
 NISSUMFJORDO. 168/12a 179/2a
 NORDA MARO. 51/16a 166/12a kp
 NORVEGUJO. 173/5z
 PARIZO. 125/5a
 PETERBURGO. 160/2a
 POMPEJO. 150/7a
 REJNO. 207/8a
 ROMO. 148/5a kp
 RUSUJO. 159/5z
 SKANDINAVA. 202/4z
 SKOTLANDO. 160/14z
 STOKHOLMO. 160/1a
 STUTGARTO. 212/18a kp
 SVEDUJO. 202/6z
 SVISUJO. 212/13z
 VEZUVIO. 150/2a
 VIENO. 125/5a
 VURTEMBERGO. 207/1a
 ZELANDO. 78/1a 104/2z 127/1z kp

LOKNOMOJ — Neasimilitaj (39):

AMAGER. 103/13z kp
 ANTVOSKOV. 127/9z
 ASSENS. 131/4z
 BASNÄS. 84/13z
 BETLEHEM. 218/4a
 BLOCKSBERG. 103/15z
 BORREBY. 76/4a kp
 BOVBJERG. 178/17z 186/2z (sen J)
 CHRISTIANSSAND. 185/16z 188/5a
 FJALTRING. 178/17z
 FÜNEN. 79/3a 131/9z
 GAMMEL—SKAGEN. 177/7a kp
 GJÖRRING. 190/2a
 HEDEBY. 40/9z 46/10z
 HROAR. 126/12z
 HUUSBY. 193/3z
 ISEFJORD. 126/10z
 JERUZALEM. 127/4z
 KATEGAT. 51/17a
 KIL. 128/15a

KORSÖR. 125/2a kp
 MARBACH. 207/4a kp
 MARSK STIG. 76/2a 86/18a
 NECKAR. 207/5a
 NYBORG. 132/9a
 ODENSE. 67/2a kp
 RAMME. 186/1z
 RINGKJÖBING. 173/7a 180/8a kp
 RINGSTED. 127/1a
 ROSKILDE. 126/11z kp (ö-eraro)
 SIGERSTED. 127/1a
 SKAGEN. 19/2z 183/13 a kp
 SKJÄRUM. 168/2a kp
 SLAGELSE. 127/10z 130/15z 197/10z
 SLYBORG. 129/3z 130/7a
 SORÖ. 127/7a kp
 VENDILSHAGA. 184/17a
 VIBORG. 87/7a 188/1a
 VOSBORG. 180/11a 180/13z

ALIAJ NOMOJ — Asimilitaj (19):

ALAHO. 225/2a
 BIBLIO. 107/3z 119/6z
 DIO. 11/8a 13/4z 27/20a kp
 DIABLO. 15/1a
 DRUIDOJ. 11/10z
 FATAMORGANO. 183/3z
 JUDA. 165/41a
 KANDELFESTO. 116/2a
 KANKREJO. 130/12a kp
 KORANO. 225/4a

ALIAJ NOMOJ — Neasimilitaj (2):

RAGNAROK. 51/19z
 SLORE-VOSBORG. 168/13z

Poste mi kompilis liston de eraroj, dubindaĵoj kaj sugestoj. Tio povus esti utila por eventuala dua eldono, kaj eble al tiuj posedantoj de la nuna eldono, kiuj volus noti ilin en siaj ekzempleroj. Mi enkrampigis miajn korektojn aŭ sugestojn:

19/6z. CIAM (ĈIAM). 23/7a. Post TERURE mankas la signo „!” 23/14a. MALFELICA (MALFELIĈA). 24/12z. Post HAVIS enmetu LA. 31/14a. SI (VI). 34/18. VANGRFAPON (VANGOFRAPON) — „GFR” ne estas prononcebla. 38/14a. MIA (MIAN). 38/3z. BOLTON (RIGLILON) — ne ŝraŭba (v. P.V.) 50/10z. ŜI NE ESTOS (ŜI ESTOS). Eble slavismo? 55/15a. DIVESAJ (DIVERSAJ). 59/8z. ĜI... ILI (ILI... ILI). 60/13a. POR (DUM). 63/4z. Tuta linio mallevita. 65/17a. LI (ĜI). 73/14a. PER (PO). 74/7a. ĜI (ILI). 80/15z. VALDAMARO (VALDEMARO). 81/12a. KUN (PER). 82/15, 16, 17a. EL (prefere PRI). Kp. 87/1a. 84/8z. JOHANIO (JOHANIO). 87/1a. KUN...KUN (prefere PRI...PRI). Kp. 82/15a. 92/9z. CIAM (ĈIAM). 93/13z. ALTAŬGA (prefere KONVENA). V. P.V. Rim. pri TAŬGECO. 93/4z. POVIS (prefere DEVUS). 97/4a. KIEN (KIE). 97/17z. MALJULINO (MALJUNULINO). 113/9a. Post la dua BONE enmetu signon „!” 114/16a. SIDIS (SIDAS). 117/14z. MALVARMA...MALSEKA (MALVARMAJ...MALSEKAJ). 124/10z. K’U (KIU). 125/16z. LE (LA). 126/11z, 3z. RÖSKILDE (ROSKILDE). 129/1a. CERTA (IU). 131/20z, 17z. V. 126/11z, 3z. 142/piednoto 3z. 1998 (1908). 143/17z. KUŜ’S (KUŜIS). 149/9z. DETEMPE DE (EKDE). 152/16a. ’OM (IOM). 152/11z. FINANĈAMIKINOJ (FIANĈ...). 154/5z. ALASPEKTA (prefere KONFORMA). 162/9z. DEBATADIS ILIAN DORSON (prefere DISSALTIGIS ILIN). 163/8a. EST’S (ESTIS). 164/12a. BALBULTIS (BALBUTIS). 169/1a. ĜIS PROFUNDA MALJUNECO — iom pli ol 30-jara! V. 192/4z. 178/9a. PLI (PRI). 178/12z. CIRKONSTACO (CIRKONSTANCO). 184/15z. ENTENDIĜIS (ETENDIĜIS). 184/15z. KUNKUNBLOVITAJ (KUNEN BLOVITAJ). V. 204/2a. 186/2z. BOVERG (BOVBJERG). V. 178/17z. 192/11a.

PRECESIO (PROCESIO). 197/6z, 5z. ĜI... ĜI... ĜI (LI — konforme kun 4z, 3z). 198/13z. SPERTA (prefere APOSTERIORA). 200/7z. ALASPEKTA — v. 154/5z. 204/2a. KUNKUNTENAS (KUNEN TENAS). V. 184/15z. 212/14a, 17a. FORMON (FORMILON aŭ FORMUJON — laŭ P.V. difino). 214/16a. EL (EN — kiel en linio 9z). V. P.V. difino (2) de KONSISTI. 218/9a. VALORAS (prefere VALIDAS). 225/17z. DE (prefere DA). 226/11a. SIAJN PANTALONOJN (SIAN PANTALONON). 226/18z. HAVAS (prefere SITUAS). HAVI estas transitiva. 233/6a. DE (PRI aŭ PRO). 233/7z. SANKTMARTINAN (MARTENAN — v. linion 4z). 235/7z. DEKUTIMIGIS (prefere MALINSTIGIS). 236/6a. LE (LA). 237/11a. KIU (KIUJ). Enhava tabelo. 2. ABOCODO (ABOCO). Enhava tabelo. 11. BARDILADO (BABILADO).

Pro kelkaj el la sugestoj en la ĉisupra listo, oni ne konkludu, ke mi aŭdace pretendas scion de Esperanto pli bonan, ol tiu de la Majstro! Mi nur supozas, ke li eble ne trovis oportunan tempon por revizii la manuskripton, antaŭ ol morti. Oni memoru ankaŭ, ke la tiutempa vortprovizo de nia lingvo estis malpli riĉa, ol ĝi estas hodiaŭ, tial li servis sin de inventaĵoj, kiuj nun ŝajnas de arkaika stilo.

Mi plue komencis listigi vortojn uzitajn de Zamenhof, sed ne troveblajn en la PLENA VORTARO. Tamen mi rezignis tion, ĉar ili probable troviĝos en la pretigata ILUSTRITA P.V., kaj cetere s-ro Butler jam esploris tiun temon, kaj metis ilin en sian novan Esp.— anglan vortaron. Temas pri **eola**, **numenio**, **vikingo**, k.a.

Estus interese kaj instrue, se aliaj esplorantoj simile dispecigus konatajn verkojn de aliaj aŭtoroj (ankaŭ aliajn verkojn de Z.), por komparado kun la rezultoj, kiujn mi ĉisupre prezentas.

Pro tio la Mond-Federacio de Sciencistaj Laboristoj organizis konferencon pri „la kondiĉoj kaj eblecoj de scienca kunlaborado en Ĉiropa”. La konferenco okazis en Vieno (Aŭstrio) de la 16-a ĝis la 19-a de aprilo 1968. La unua tago estis rezervita por la kolektiĝo, rapida (ĉiobusa) konsiligo kun la plej gravaj vidindaĵoj de Vieno kaj por la komuna vespermanĝo en la periferia vilaĝo Grinzig. Kvankam la unua tago fakte ne apartenis al la konferenco mem, tamen ĝi multe helpis la konferencan upleĵon multe la gaja vespero en Grinzig, krome jam de la komenco anstataŭ atmosferon inter la partoprenantoj de la konferenco.

La celo de la konferenco ne estis fari iujn decidojn nome de la Mond-federacio, sed nur priklari la kondiĉojn kaj instigi al la plej ventadote pli bonaj solvoj por la problemoj. Pro tio la nomo de la